JANUARO 1957 N-RO: 2

La Objektivo

Organo de Asocio por
Universala, Racia kaj Objektiva Homkulturo
S. A. T. en Sudameriko

Administrado kaj Redaktado:
G. Ledon - rua B. Martins, 371
PELOTAS - R. G. S. - Brazilio

LA RUTINO

KAJ JOZEFO INĜENIEROS

Jozefo naskiĝis en Buenos-Ajres la 24-an de aprilo de 1877. Ekde 1896 li komencis publikigi eseojn pri sociologio kaj kriminala antropologio. Li diplomiĝis je medicino en la Buenos-Ajresa Universitato (1900), kaj li dediĉis sin al studoj pri nerva kaj mensa patologio. Oni nominacis lin ĉefo de la kliniko pri nervaj malsanoj en la medicina fakultato, kaj direktoro de la servo por observado al frenezuloj (1901). Li lekciis pri neŭropatologio en la medicina fakultato (1902-3) kaj li gajnis konkurse la katedron pri eksperimenta psikologio ĉe la filozofia fakultato (1904). Li reprezentis la Argentinan Respublikon ĉe la 5-a Internacia Kongreso pri Psikologio, okazinta en Romo (1905), kie oni nomis lin Estro de la Fako pri Patologia Psikologio. Em 1905-6, li vizitis la eŭropajn universitatojn, donante sciencajn prelegojn kaj verkante por la ĉefaj revuoj. Li estis prezidanto de la Argentina Kuracista Asocio kaj de la Psikologa Asocio. Ekde 1911 kaj ĝis 1914 li kompletigis ĉe la pariza, laŭzana kaj hejdelberga universitatoj siajn sciencajn studojn, por dediĉi sin al filozofio. Speciale invitis lin la Karnegia Fondaĵo por ĉeesti la sciencan kongreson en Vaŝintono (1916). En 1925 la franca registaro invitis lin ĉeesti la solenojn pri la 100-a datreveno de la naskiĝo de Ŝarko (Charcot). Samtempe la meksikia registaro invitis lin viziti tiun landon kiel honora gasto. Reveninte al Argentinio li forpasis la 31-an de oktobro 1925.

Liaj ĉefaj verkoj estas laŭ merito: "La triviala Homo", "La simulemo en la lukto por la vivo.", "Traktato pri amo", "La simulado de frenezo", "Psikopatologio en la arto", "La Ameginaj doktrinoj", (vidu Sennaciulon apr. 55), "Histerio kaj sugestio", "Vojaĝaj Kronikoj", "La filozofia kulturo en Hispanio". Ili estas vendeblaj ĉe "Editorial Tor", Buenos Ajres, hispanlingve.

"La triviala Homo", unu el liaj plej sukcesaj verkoj, konsistas el liaj lekcioj pri karaktera psikologio, donitaj de la aŭtoro ĉe lia katedro de la Filozofia Fakultato (1910). Dum tiu kaj la

sekvinta jaroj ili estis publikigitaj de la ĵurnalo "La Nación", kaj poste kolektitaj en la Analoj de Psikiatro kaj Kriminologio (1911). Kunordigita kaj korektita, ĝi aperis unuafoje laŭ eldono de la "Renacimiento-biblioteko", Madrido (1913).

Inĝenieros (pron. inĥenjeros) intencis brulstampi la fatalajn moralajn ulcerojn, kiaj la rutinemo, hipokriteco kaj servutiĝo, dezirante esti utila al la junuloj, kiuj povas eviti ilin, krei al si idealojn kaj nobligi sian vivon. Sed pli ol en la efiko de siaj paroloj, li kredis en la forto de siaj ekzemploj: ekde kiam li eldiris de sur la katedro tiujn lekciojn, finante sian eksteran karieron je la aĝo kiam ĉiuj pretiĝas ĝin ekkomenci, li vivadis konforme al siaj principoj, rezignante ĉerpi profiton el komplicaĵoj kaj moroj kiujn li konsideradis nedecaj. Oni diras tute prave, ke la uloj plej abomenindaj estas la moralpredikantoj kiuj ne akordigas sian konduton al siaj paroloj. Inĝenieros sicias ke malmultaj moralistoj povus verki tion ne sentante sian manon tremi . . .

Jen resumo de ĉapitro el "La triviala homo", pri la rutinemuloj, kie ni rimarku la stilon koncizan kaj frape ĝustan, plenan je tropoj.

La rutino ne estas ido de la sperto, sed ties karikaturo. Unu estas fekunda kaj vergeneranta, la alia estas senfrukta. En ĝia orbito rondiras la trivialaj spiritoj, ripetante ke estas preferinda la malbono konata ol la bono konota.

Kutimiĝintaj imiti simie la antaŭjuĝojn de la propra medio, ili akceptas senkontrole la ideojn distilitajn en la socia laboratorio. Ĉe la rutilemuloj, ĉio estas minimuma peno, ĉar la rutino estas la kutimo rezigni la pensadon. Al ĉiuj sensoj fine ŝajnas naturaj la agoj kiuj komence provokis pudoron.

La antaŭjuĝoj estas kredoj antaŭaj al la observado: la juĝoj, jen ĝustaj, jen misaj, sekvas ĝin. La kutimoj ekiritaj de la originalaj homoj estas esence

iliaj, ili konsistigas ilian kriterion kiam ili pensas, kaj ilian karakteron kiam ili agas. Ili diferencas larĝe je la rutino kiu estas kolektiva kaj ĉiam malutila, ekstera al la individuo, rilata al la grego. Ĝin konsistigas la kontaĝo de la antaŭjugoj, kiuj svarmas ĉe alies kapoj.

La socia edukado enhavas tiun danĝeron: ĝi celas forvisi ĉian originalecon metante samajn antaŭjuĝojn en malsamajn cerbojn: neniam oni vidis stultulon originaligitan pro apudesto, sed ofte okazas ke inĝeniuloj senvigliĝas meze de malsaĝuloj.

La rutinemuloj rezonas per alies logiko, ili cedas sub la premo de la grego, forĝeblaj sub la pezo de la publika opinio, kiu ilin platigas kiel senkompata laminatilo. Ili vivas per alies opinio: ili kredas sin mem kiel la aliuloj kredas ilin. La homoj superaj malestimas la opinion de la aliaj kaj respektas sian propran. Aŭdante rutinemulon paroli unu horon, ŝajnas ke ĉi-lasta enhavas mil minutojn.

La nesciado estas ilia turmentisto kiu igas ilin pupoj de ĉiuj fanatikismoj. Ili komisius kune lupon kaj ŝafon, mirante sincere se la lupo revenas sola. Ili malhavas bonguston kaj kapablon ĝin akiri. Ili ne scias ke la homo valoras pro lia saĝo. Ili neas, ke la kulturo estas la plej profunda fonto de la virto. Ili ne intencas studi, suspektante eble la vanecon de sia klopodo. Ilia malkapablo meditadi konvinkas ilin, ke ne ekzistas malfacilaj problemoj, kaj ili preferas konfidi je sia nesciado por diveni ĉion.

La legado efikas tokse sur ilin. Ili nur ŝatas banalajn legaĵojn, per kiuj ili plenŝtopas sian menson, nesciante ke la homo vivas per tio kion li asimilas, ne per tio kion li englutas. La plej nelacigebla pacienco ne transformas rutinemulon je pensulo.

Ili ne suspektas, ke pli plezure estas marŝi en direkto al la vero ol atingi ĝin. Iliaj kredoj ampleksas regionojn limigitajn de superstiĉoj. Ili nomas idealoj siajn zorgojn, ne rimarkante ke ili estas nura rutino. Ili estas prozaj kaj ne havas volon perfektiĝi. La manko de idealoj malhelpas al ili meti en siajn agojn la saleron kiu poetigas la vivon.

Flober (Flaubert) priskribis ilin en siaj verkoj: "Esti stulta, egoista kaj bonfarti, jen la tri kondiĉoj por esti feliĉa, sed se mankas al vi la unua, ĉio estas perdita." Kontraŭ ĉiu konstruisto de idealoj enviciĝas sentime mil Sanĉoj, simboloj de la materialismo, kvazaŭ por haltigi la venkon de la vero, devus komploti ĉiuj bandoj de la stultularo.

La rebrilo de la originaleco blindigas la rutinemulon. Li forkuras el eminentaj pensuloj, ĉar li timas ebriiĝi per la parfumo de ilia stilo. Se li havus la potencon, li proskribus ilin amase, restarigante la Inkvizicion aŭ la Teroron. Ĉiuj rutinuloj estas netoleremaj: ilia magra klero kondamnas ilin je tio. Ili defendas anakronismojn kaj absurdaĵojn, ne permesante ke iliaj opinioj eltenu la kontrolon de la sperto. Ili nomas herezulon, tiun kiu serĉas veron aŭ sekvas idealon, malkonante la sentencon ŝekspiran: "Herezulo ne estas tiu, kiu pereas en la brula ŝtiparo, sed tiu, kiu ĝin bruligas." Persono kiu longe strebadis por formi al si kredojn scipovas respekti alies kredojn.

La rutinuloj forrifuzas la veron kaj la virton, se ĉi-lastaj pruvas la eraron en iliaj antaŭjuĝoj. Ĉe ĉiu nova ideo ili antaŭsentas danĝeron. Se oni dirus al ili, ke iliaj antaŭjuĝoj estas novaj ideoj, ili kredus ilin danĝeraj. Ili preferas la silenton kaj la inercion. Ne pensi estas ilia sola maniero ne erari.

La okuloj de la rutinema homo ne kapablas apartigi la lumon disde la ombro. Ili konfuzas la toleremon kun la malkuraĝo, la diskretemon kun la servuteco, la komplezon kun la malindo, la ŝajnigon kun la merito. La rutinemuloj ne suspektas ke la dubo de la supera homo estis ĉiam alispeca, antaŭ ol tion klarigis Kartezio. Estas peninde korekti la proprajn erarojn, ĝis kiam oni lernas ke ĉiu kredo estas mankohava, kaj ke la idealoj permesas senfinan perfektiĝon. La rutinuloj, kontraŭe, korektiĝas aŭ malkonvinkiĝas neniam. Iliaj antaŭjugoj estas kiel la najloj, ju pli oni ilin frapas, des pli ili eniĝas.

Se idealo radias el la paĝoj, se la vero skuas la pensojn en la frazoj, la libroj ŝajnas al ili bruligindaj. Se ili povas esti luma gvido al la estonto aŭ al la perfekteco, la rutinuloj malkonfidas je ili. Ili vivas vivon ne vivsimilan. Ili kreskas kaj mortas, kiel la plantoj. Ili ne bezonas esti scivolemaj, nek observemaj. Ili estas prudentaj, el neeltenebla prudento: se unu el ili preterpasas la klinan turon de Pizo, li malproksimiĝus de ĝi, pro timo esti frakasita. La homo originala, senprudenta, haltas ĝin rigardadi; geniulo faras eĉ pli: li suprengrimpas la turon, observas, meditas, provas ĝis kiam li malkovras la plej altajn leĝojn de la fiziko.

Se la homaro estus kalkulinta nur kun la rutinuloj, niaj konoj ne superus tiujn de la prahomo. La kulturo estus frukto de la scivolemo, de tiu mistera malkvieto, kiu pelas rigardi la fundon de ĉiuj aferoj. La malsaĝulo ne estas scivolema, neniam demandas al la naturo . . .

Kiu kuraĝas malkonfidi je la rutino, tiu homo estas Njuton, aŭdaculo, kiu konjektas similecon inter la pala lampo ŝvebanta en la ĉielo kaj la pomo kiu falas el la arbo skuata de la vento. Neniu rutinemulo estus eltrovinta, ke sama forto rotaciigas la lunon supren, kaj faligas la pomon malsupren.

En tiuj homoj, imunaj je la pasio pri la vero, ne estas impulsoj al perfektiĝo. Ne disbati la propan nescion estas perei viva. Samkiel la fekundaj grundoj herbokovritaj, kiam ili ne estas kultivitaj, tiel la rutinemaj spiritoj pleniĝas de antaŭjuĝoj kiuj sklavigas ilin.

E. H. GARROTE

LA OBJEKTIVO

La redaktado kaj administrado de "La Objektivo", estos principe sub la rekta respondeco de la Plenum-Komitato. La verkantoj de artikoloj respondecas pri la ideoj esprimitaj. Pseŭdonimoj estas akceptataj kondiĉe, ke la redakcio konu la identecon de la aŭtoroj. "La Objektivo" estas redaktita komplete en Esperanto. Nur referencaj citaĵoj povas esti en naciaj lingvoj.

KONDIĈOJ DE ABONO: Cele al Helpo de laboristaj kamaradoj mone malstabilaj, kaj kiel eksperimento pri la homa solidaro, konscio kaj devo, ni ne postulas specialan abonkondiĉon por la membroj de nia Asocio: ĉiu pagas laŭ sia povo!

Por la ceteraj abonantoj el ĉiuj partoj de la mondo la abonprezo estas: 10 (dek) numeroj por $ 1,00 U. S. dolaro aŭ $ 50,00 brazilaj Kruzejroj aŭ egalvaloro.

ATENTU: Ĝis la formiĝo de P-K, kaj por ke ĉiu povu verifiki la iron de nia Asocio, ĉiuj spezoj estos publikitaj.

Asocio por Universala, Racia kaj Objektiva Homkulturo

(Sudameriko Sekcio de S. A. T.)

Tiu asocio ĉi supre nomita, celas grupigi kaj kunlaborigi ĉiujn membrojn de Sennacieca Asocio Tutmonda en Sudameriko, kaj disvastigi ties ideojn.

La ĝenerala linio sekvota estas konforma al la ĝisnuna vojo de SAT, kaj bazita laŭ la SAT-statuto kiu estas plene akceptita. (La 35-jara, honesta kaj hom-konforma ekzisto de SAT, kiu sciis venki montegojn da perturboj pruvas, ke ni estas sur firma bazo ... tial ni neniel modifos tiun fundamenton.)

Nun ni proponas kiel aparta gvidrezolucio la jenon:

"NI KONSCIU PRI NIA HOMA POZICIO FOR DE LA MISTIKAJ PERTURBOJ, FOR DE LA DIAJ FIKCIOJ, FOR DE LA AGITADOJ POLITIKAJ, FOR DE LA FILOZOFAJ METAFIZIKAĴOJ, FOR DE LA KREDOJ ARTEFARITAJ KAJ DOGMAJ. NI ELIRU LA ĜENERALAN MISTIFIKADON EN KIU VADAS NIA HOMARO, POR KE NI POVU ANTAUVIDI KAJ KONSTRUI PLI HARMONIAN SOCIORDON: VERAN SOCIALISMON."

La nomon de la asocio ni jam skizis kaj priparolis en la provnumero. Ni vidis ke "laborista organizo" ne estus tre trafa, nek konvena en la nuna situacio, kvankam nia afero nur povas servi al la laboristaro. Paroli pri klasbatalo estus same sensignifa, tiel ni opinias ke la nomo: "Asocio por Universala, Racia kaj Objektiva Homkulturo", reflektas multe pli bone la realan celon de SAT, en nia nuna epoko. HOMKULTURO: La vorto: kulturo, laŭ la difino mem entenas la ideon de perfektigado, klerigado per racia edukado. Ni aldonis: homo, por fortigi la ideon kaj por bone orientigi tiun kulturon: Bazita sur la homo kaj por la homo. UNIVERSALA: venas por bone precizigi ke tiu formo de kulturo ne estas apartaĵo, sed destinita al la tuta homaro, je la atingeblo de ĉiu. Ĝi estas vasta adjektivo kiu entenas samtempe la vortojn: Sennacieca, Tutmonda, kaj pravigas nian oficialan lingvon: ESPERANTO. RACIA KAJ OBJEKTIVA: Kvankam tiuj du adjektivoj estas teorie, kvazaŭ entenataj en la vorto kulturo, ni aldonis ilin por bone emfazi ke nia kulturo devas fonti en faktoj ekzistantaj, kaj esti deduktitaj, ja per noma rezono, sed el konkretaj fenomenoj, ĉiam rilatantaj al la homa manifesto. Tiuj du vortoj eliminas do ĉiajn mistikon, dogmaron, kulton kaj ceterajn intuaĵojn. Same metafiziko, subjektivaĵoj kaj aliaj eventualaj pseŭdofenomenoj ne normale percepteblaj de ĉiu kaj ĉiuj, forigas.

Konsiderante tiun starpunkton ni vidas, ke nia agadkampo atingas ĉiujn temojn, interesantaj la homon, de etiko al scienco kaj tekniko, kaj ĉiujn homajn sintenojn kaj agojn.

Kiel ni vidis en nia unua bulteno estas malfacilege antaŭestabli grandajn aktivecojn. Tamen io estas fundamenta kaj facila: Ni aludas la interrilaton per nia organo. Jes, se tiu-ĉi funkcias glate, ni prosperos, prosperegos, kaj aŭtomate pliaj aktivecoj kreiĝos: Kongresoj, lokaj grupoj kun konferencoj k. c. Do ni unue koncentru niajn fortojn je tiu punkto, je nia stimulilo, je la koro de nia movado: nia organo, nia tribuno, kiu povas aŭdigi relative facile sian voĉon ĉie kaj tiel plenumi sian celon. Ni ripetu: tio estas facilega rimedo, dependas nur de ioma volo, ioma sinofero kaj kuraĝo nia. Pri tiu organo, ni jam proponis la nomon: "La Objektivo", versajne ĉiuj aprobis ĉar ni ne ricevis kontraŭajn opiniojn.

Kiel vi konstatas, ni sukcesis, post ioma peno, aperigi ĝin eĉ presite, ni tiel faris la unuan paŝon, nun ĉiuj devas sentime kune paŝi, por ke ni longe eltenu la grandajn pezojn ... Ni ne parolos pli longe, ni scias, ke vi konscias pri la graveco de la entrepreno kaj kunlaboros laŭ via modesta eblo ...!

El la Dormo... Al Batato!

Por atingi tuj la venkon,
Ni ja devas al batalo,
Ĉeesti pli ol al balo,
Kaj eĉ lasi l'ripozbenkon.

Ĉu ripozi al ni eblas
Dum turmentas la mizero?
Jen faŝismo sur la tero,
Blovas! Kaj l'homaro, feblas!

Malfortas pro mistifiko.
Pro Dio kaj artifiko,
Ekstazas antaŭ idolo.

Dum premadas la despotoj,
Ni dormadas en narkotoj,
Ho ni! Homoj for l'homrolo...!

G. L.

ORGANIZO DE NIA ASOCIO

NOTO: Tiu organizo estas kompreneble provizora ĝis la formiĝo de membraro, kaj ĝis la elekto kaj establo de Plenum-Komitato.

MEMBRECO: Ĉiu individuo, kiu aprobas la SAT statuton, la fikzitan rezolucion, resumanta nian celon, kaj nian kriterion de agado entenatan en la nomo de la Asocio, povas esti membro de Asocio por Universala, Racia kaj Objektiva Homkulturo.

Por membriĝi ĉiu individuo devos esprimi sian deziron pri aniĝo, aldonante 2 (du) respondkuponojn aŭ egalvaloron. Tiu simbola sumo, pagata unu fojon en la daŭro de la membreco, utilos por liverado de membrokarto.

La membro havas la moralan devon kunhelpi en la entrepreno laŭ siaj eblecoj kaj partopreni aktive la vivon de la organizo, per opinioj, balotoj k. c.

Ĉiu membro kiu deziras eksiĝi nur bezonas tion komuniki al la sidejo de la Asocio. Ceteraj eksiĝoj estas konformaj al tiuj de SAT.

PLENUM-KOMITATO: La Plenum-Komitato respondecas pri la Asocio kaj gvidas ĝin. Ĝi konsistas el kelkaj membroj, referendume elektitaj por tempo kaj kondiĉoj fiksotaj.

La komitatano devas esti aktiva membro kiu efektive partoprenas la movadon. Li aŭ ŝi, devos krome bone estri Esperanton. Ĉiuj tiaj membroj rajtas kandidatiĝi.

Ĉiuj aliaj punktoj pri organizo estos fiksitaj de la membraro per referendumo.

De L'Genezo de la Idealismo

Idealismo, laŭ la difino, estas celado al perfekteco. Havi idealon, estas posedi firme idearon aŭ ideon kiu inspiras niajn agojn kaj sintenojn, kiu orientas nian ekziston al belo, harmonio, por ĉiam pli granda perfekteco.

Laŭ tiu unua kompreno, eblas eksenti, ke idealismo estas io tre fleksebla, kiu dependas nur de individua interpreto de la vortoj: belo, harmonio, perfekteco. Tiam ni povos timi ke idealismo estas praktike senvalora, kaj ke laŭ tiu fundamenta principo, la murdisto kaj vandalo perfortu kaj detruu. Feliĉe ekzakte tiel ne estas. Okazas ke sub la gildo de idealismo homoj murdas, ke ili neniigas, koruptas kaj renversas la tutan homan harmonion, sed tio estas anomalioj kie la homo prenis sian bazon, sian gvidideon por ago kaj sinteno, for de la natura manifesto de nia genro.

Reale, la genezo de la idealismo estas kunfandiĝanta kun la homa spontaneeco, kun la homa kaŭzo, kun Dia volo, diras ĝenerale la religiuloj kaj dikredantoj. Hodiaŭ ni ne konsideros tiun homan kaŭzon, pri kiu ni nenion povus efektive ekspliki. Kiel devena fenomeno de amo: inklino al ege kara ŝato por io aŭ iu, dira P. V. Amo, ekzemple de patrino al gefiloj, de la edzo al la edzino. Ni ankaŭ menciu la ĝeneralan tujan kortuŝiĝon de la homo antaŭ la sufero. Ni starigu la spontanean teroron de la normala homo antaŭ la demona krimulo. Jen tiom da fenomenoj kiuj montras kiom la homo sopiras al harmonio, perfekteco, kaj klopodas en idealismo. Ni sentas, ke tiu amo propramova, estas la fonto de la harmonio, ni sentas ke la idealo estas la amo mem, tiu homa amo ĉiam malprecize difinita, kiu jes, universaligas la idealismon. Sendube tiuj kelkaj vortoj sufiĉas por komprenigi kio estas idealismo, tial nun, ni nin turnu al la praktika bazo de la idealismoj, ĝenerale esprimitaj en ĉiuj doktrinoj kaj principoj kiuj regas nin en la sino de la homa socio.

Tie ĉi, ni konstatas ke tiu fundamenta, praktika principo de idealismo estas unika, kiel la amo. Ni konstatas, ke ni ne devus paroli pri idealaj doktrinoj, kaj ceteraj teorioj sed pri la idealo. Ni konscias, ke ni perdas nian tempon kiam ni disputas pri interpretoj de doktrinoj, pri vero kaj malvero, ni vidas unu fojon plian, ke ekzistas unu nura idealo, unu celado al perfekteco, apogita sur unu nura principo,

Nu, por esti pli koncizaj, ni rigardu iom tra tiuj doktrinoj. La kristana idealprincipo, per la voĉo de Jesuo Kristo diras: "Amu vian proksimulon kiel vin mem." Ĉu ne estas perfekta deirpunkto por vera harmonio? Kiu, ne freneza homo povus nei tion-ĉi? Kaj Konfucio kiu diras: "Ne faru al aliaj, tion kion vi ne volas, ke oni faru al vi", ĉu li ne prezentas bonan bazon? Principon tute similan al tiu de Kristo? Ĉu iu, kiel saĝa homo riproĉas Budon, kiam li diras: "Malamu neniun, ne plendu... puro en konfido, volo, parolo kaj ago!"

Ankaŭ la sama idealismo respeguliĝas ĉe la homoj kiuj predikas: "Pacon sur la tero, al bonvolemaj homoj." Ni ne dubu, la granda principo de demokrateco, kiun starigis la respublikanoj okaze de iuj revolucioj, ankaŭ same valoras; jes, la vortoj: libereco, egaleco, frateco, estas idealaj, ili perfekte celas harmonion. Ĉiu principo de moralo el iu ajn sincera fonto, volas montri al ni vojon por harmonio kaj feliĉo. La idealismo apartenu al teorioj kun mistika karaktero, la doktrinoj baziĝu en la metafiziko aŭ la fiziko, en spirita aŭ materia kredo, ĉiam la idealo restas sama en sia principo. Sincera katoliko, absolute same kiel sincera anarkiisto, volas homan plibonigon, strebas al vera harmonio, ĉar la bazo de ambaŭ estas reale la sama. Jes, sen granda eraro ni povas aserti, ke ĉiuj homoj normalaj kaj sinceraj klopodas por la sama celo, ni povas aserti, ke ekzistas unu nura idealismo: la barakto al homa harmonio, al reciproka amo por pli vasta perfekteco.

Nu, se ĉiuj posedas la saman idealon, kial ĉiuj kaj ĉiu fiere vantas kaj volas altrudi sian propran penson? Kial el la belegaj paroloj de Kristo greftiĝis miloj de apartaj doktrinoj, kie la homoj sin malamas kaj kontinue inkvizicias?... Ĉu la principo de idealismo ne elmontras la toleron antaŭ ĉio? Certe jes, ĉar se oni amas sian proksimulon, tio subaŭdigas, ke oni unue bezonas lin toleri! Logike ĉiu homo havas apartan penskapablon, tiel ke normale, ĉe ĉiu individuo estas aparta interpreto de idealo, sed ĉu tio devas nuligi la idealon mem? Evidente ne, ni nur vidas ke la tolero estas parto de tiu idealo.

Jen kie ni alvenis, la baza idealo estas universale akceptata, ĉiuj homoj sin bazis sur la sama spontanea homa principo. Ĉiuj homoj batalas, oferas sian tutan vivon por la sama mondharmonio, por la sama homfeliĉo, kaj jen, ĉiuj konstatas en la plej granda konfuzo kaj malamo, ke la homa socio vegetas en malekvilibro, en granda ĥaoso. Jen la paradokso! Jam antaŭ du mil jaroj parolis la profetoj, antaŭ du mil jaroj ekstariĝis tio, kion oni nomas: nia civilizo. La homo lernis fabrikadon de maŝinoj, ĝi eksciis uzi sciencojn kaj teknikojn plej diversajn por mildigi al si la ekziston, sed ĉu nun, praktike, ĝi vivas pli ideale, pli harmonie? Ho ve multa observado kaj pripensado ne estas bezonataj por konstati, ke apud la sincera idealismo, regas la mensogo, la falsigo, la homa avido, la tuta malracio.

Dum iuj vokas al amo, tolero kaj harmonio, kvazaŭ eĥas aliaj voĉoj pri bataljonoj, atombomboj kaj militoj. Dum daŭre oni sloganas per: libereco, egaleco, frateco, popoloj estas subprematoj kaj malsatantaj... Dum riĉuloj lukse paradas, mizeruloj jugitaj sklave penadas. La voĉo kiu matene vokis al amo, ofte, vespere, instigas al sangelverŝo... Kaj ĉio ĉi-tio je la principo de la sama idealismo. Je nomo de l'idealo ni same akceptas la subpremon de la ekspluatantoj, ni same iras al milito, alkonformiĝas, aprobas aŭ refutas novajn kredojn.

Jes, malgraŭ ĉi-tiu individua sincereco kiu envolvas nin ĉiuj, malgraŭ tiu universala bazo de harmonio kaj tutmonda feliĉo, post miloj da jaroj de la komenco de nia nomita civilizo, ni daŭre vane baraktas, daŭre suferas kaj suferigas tute male al nia gvidprincipo kaj kaŭzo mem. Jes, la socia fenomeno de la homo estas tiel altgrade stranga kaj paradoksa, ke praktike, la agoj konstateblaj estas ekzakte la kontraŭo de la motivigo de tiuj samaj agoj. Vi dubas? Jen, dum daŭre sin organizas novaj movadoj, novaj doktrinoj por la homa bono, laŭ la idealprincipo kiun ni jam vidis, en la sama momento, en ĉiu minuto, kiu fluas en la tem-

.. Al la Celo de nia Asocio

po, furiozas almenaŭ unu organizita "liberiga" milito, en kiu ajn parto de la mondo. Cetere neniu konflikto restas sen ideala klarigo: Ja, la komunisto-bolŝevisto, kiel idealisto prenas la karabenon por instali sian liberon, la grandan egalecon, la grandan koman amon kiun instruas lia doktrino... same la nekomunisto, ne malpli konvinkiĝinta, pafas por konservi la liberecon kiun instruas lia organizteorio.

Dum en sia katedro la pastro konvinkige asertas: "la nura Dia vero, estas la vero de la katolika eklezio!" la protestanta predikanto certigas, ke la dia vero estas rivelita de la protestanta sekto. La spiritisto diras: "Ne, estas mi kiu havas la veron, vidu!..." Tion ankaŭ diras la materialisto, la budisto, la ekzistadisto, la anarkiisto, la kvakerano, la teozofiisto, la surrealisto kaj ĉiuj aliaj... kaj ĉiuj estas idealistoj, idealistoj kun la sama principo de amo kaj karmonio, de vero kaj perfekteco, de homo.

Do, kiu konfuzo estas tiu, kiu historio estas tio? Ĉu ni estas veraj infanoj, veraj pulĉineloj? Ĉu ni frenezas? Ĉu ni klopodas en labirinto, kaj ne plu kapablas retrovi ties elirejon? Jes, fakte en labirinto ni estas. Almenaŭ, per tiuj kelkaj linioj ni nin situigis en labirinto, kaj nun, verŝajne ĉiuj pretas postuli: "Do, nun, diru al ni vian veron, vian doktrinon kiu estas la reala, la nura, la ideala solvo!" Nu! Kiu kuraĝa homo trudu al ni: "Jen la homa vojo, la vera intruo." Tiam, tiu mistifikus nin, kaj ĝuste la celo de tiu organizo, estas vidi ĉu eblas eliri la mistifikadon.

Tial, ne atendu de mi, ke mi skribu: "Dio estas tio", aŭ "Dio ne ekzistas", ion tian mi efektive ne scias, tion kion mi povus fari, estus ĉerpi kaj prezenti al vi argumentoj por kaj kontraŭ, kaj vi mem povus debati pri pravo aŭ malpravo, vero aŭ malvero... sed vanus la klopodo, Ne deziru ke mia konkludo estu: "Sekvu tiun idealon!", ĉar jam sufiĉe multe da profetoj el ĉiuj kurentoj perfidis kaj perfidigis la fundamenton de nia harmonio. Ne dirigu al mi, ke Petro estas fireprezentanto de idealaĉo, ke flugtelero venas de Rusio, Marso aŭ de la tercentro, ke la spiritoj postvivas, reenkarniĝas aŭ restas en la paradizo. Ne, nenion tian mi scias, nenion tian mi volas ĉi-tie pridiskuti. Tamen mi diros al vi mian pozicion, ne kiel vero, sed kiel simpla opinio, ideo kiun vi rajtas refuti, rifuzi, nei, sed kiun vi ankaŭ povos unue saĝe pripensi kaj provi.

Ĉu ni ne estas homoj? Jes, ni estas. Ni ankaŭ estas ĉiuj idealistoj laŭ la ideo unue difinita. Ĉiuj el ni, home sopiras al homa bono kaj harmonio. Do, kial ni ne agas tute simple kiel homoj? Kial ni ŝablonigas nian sintenon, kial ni ne pensas per nia propra cerbo sed tra alies teorioj? Anstataŭ diri: "Mi faras tion ĉar Dio, per Kristo, Budo, Jehovo, Pio 1, 2, 10, ĉar Marks, Niĉ, Getulio Vargas, Peron tion instruas", kial, nur por provi ni ne diras: "Mi agas tiel, ĉar estante homo, mia ebleco estas tiu, sed, se tiel mi agas, mi kontraŭas, malhelpas min mem kaj mian najbaron, tial, mia sinteno devas esti tiu." Aspektas naiva, mi scias, tamen!

Kial ni mem ne iniciatas nian sintenon sed ĉiam atendas, ke la leĝo estu dirinta: "Laboru, Iru..." ke la deputito por ni parolu, ke nia estro estru kaj postulu: "Silentu, retroiru, ktp. ktp" Kial ni estas ŝafoj, gurdoj? Ĉu ni timas? Kial ni rigardas la najbaron kaj laŭ li iras, eĉ se ni konscias, ke li dronos? Ĉu ni ne kapablas mem fiksi nian sintenon? Ĉu ni bezonas esti aŭtomataĵo? Kial ni ne pensas unue per ni, per nia propra penso, kiun ni kutimas lasi en letargio pro simpla mallaboremo. Jes, kial ni ne provas esti unue homoj, kaj nur poste komunistoj, baptistoj, umbandistoj, respublikanoj.

Jes, se ĉiuj estas unue homoj, kaj spontane pensas kiel homoj, ĉar ĉiuj homoj apartenas al la sama genro: la homa, kaj havas la saman idealon, tiun kiun ni jam esence skizis, nur povas naskiĝi harmonio, interkonsento. Sed se la homoj pensas antaŭ ĉio, iuj kiel komunistoj, la aliaj kiel kristanoj aŭ reĝanoj, tiam jes, la kriterioj diferencas, komplete maskita, kaŝita estas la fundamento, kaj la ĥaoso aperas en granda mistifikado.

Esti homo signifas do, pensi, agi kiel homo kaj ne kiel strečita aŭtomataĵo. Esti homo signifas: forĵeti ĉiujn antaŭpreparitajn doktrinojn kaj principojn kiuj mistifikas nin kaj transformas nian sintenon; esti homo signifas: konsideri sian propran eston en la kadro de la socio, objektive, racie, por povi agi laŭ la homa karaktero, laŭ nia "idealo", kiu ĝuste entenas la homan karakteron. Objektiva konsidero, mi aludis? Ni komprenu, laŭ la difino mem: efektive ekzistanta, do de ni, per niaj sensoj konstatebla, palpebla, nerefutebla. Racia: tio signifas: for la fantazio, la pura mistiko, la intuo.

Pri la homa karaktero mi jus diris, ke ĝi estas en la fundamento de la idealo; ni ripetu la kristan parolan: "Amu vian proksimulon kiel vin mem." Via proksimulo, signifas: la aliaj homoj, la homoj kiuj kun vi formas la socion. El tio ni vidas ke la homo estas esence sociema. La diro: "Vi mem," estas la marko de la homa egoismo. Ja, kiel ajn ni ekzamenu la homon, ni retrovas tiujn iom kontraŭajn karakterojn: la egoismo kaj la sociemo. Kaj la fundo de l'idealo estas ĝuste la harmoniigo de tiuj kontraŭecaj karakteroj. Verdire, por harmoniigi, oni devas koni kaj konscii la fenomenojn.

La problemo ideala resumiĝas do al konsciado de sia ekzisto en la socio. Nu, se la homo racie kaj objektive sin konsideras, laŭ la plej simpla rimedo, sed per la tutaj homaj kapabloj de rezono kaj logiko kiuj, ĉiuj scias, manifestiĝas spontanee ĉe nemistifikataj individuoj, tiam, tiu homo komprenas ke egoista li estas, sed ke sola, sen la socio, li ne povas vivi... Kaj ŝajnas al mi, ke je tiu grado de homeco, la harmonio estas atingita, sen doktrinoj, sen diaj ordonoj (home interpretataj!) sen konfliktoj, tra la homo mem, en la plej simpla formo de socia movo.

Tiuj lastaj vortoj rapide esprimitaj, certe sonas kiel propono por malplenigi la maron. Tion mi scias, ĉar ni ĉiuj estas viktimoj de nia mondkoncepto de mistifikitoj, sed tio ne malhelpas, ke ni pripensu... kaj eble ni renkontos ĉi-tie nian veran "Objektivon", intertempe ni provu, kaj tiu provo estu la celo de nia Asocio.

LEDON

La cirkonstancoj formas la homon, sed la KONSCIA homo ŝanĝos la cirkonstancojn.

Nia vivkroniko: de L'Patrifesto al Faŝismo.

Ĉe ni, en Brazilio, la unua semajno de septembro estas la nomita: semajno de l'patrio, kiu finiĝas per la nacia festotago... glora rememoro pri iu sendependeco. Nu nenio stranga kuŝas en tio, ĉiuj posedas sian patrian feston jam de multe da tempo! Jam de 1789, la francaj revoluciuloj, "la framasonoj, diras la framasonoj", (sic), difinis tion kio estas patrio: ja forbruligante fortreson kaj starigante la gilotinon de la justico!... Kaj, ĝis nun oni festas la 14-an de julio kiel nacian feston en Francio. Intertempe, ĉiuj aliaj malkovris kaj neniigis sian Bastijon (Bastille)...

La hazardo okazigis mian naskiĝon en Francio, kaj ĝis antaŭ nelonge mi tie vivis, kaj iel partoprenis la naciajn festojn. Aparte mi iam soldate paradis kun pafilo sur la ŝultro. Estis en Tuluzo, en 1951, sur belega avenuo, mi memoras, ke dum ni, tuta bataljono, kadencis sur la pavimoj, kelkaj deketoj de rigardemuloj spektis bove. Kaj mi naŭziĝis... Tamen ĉio daŭris nur horon, kaj sekvis eksterordinaraj cigaroj kaj vinoj, kiujn cetere mi ne profitis pro malŝato!

En Parizo, certe iom pli da soldatoj estis, iom pli da bovaj rigardantoj staris; oni ja eksplodigis kelkajn raketojn, kelkaj ĝuemaj profituloj du tagojn antaŭe kaj du noktojn poste bruadis, sed estis nura privata dibočado. Mi memoras, ke krom soldatoj, paradis tankoj, kanonoj, militistaj lernantoj flagumitaj. Ankaŭ veteranoj medalumitaj ekbruligis estingitajn animajn flamojn el la unua lasta, kaj el la dua lasta hombučejoj, atendante la trian lastan... sed estis, ĉio! Tio okazis unu fojon, unu matenon, nenian antaŭpreparon oni vidis, malmultaj priparolis la solenon, aŭ ĝin senpacience atendis ĉar ili ne forgesis la feriotagon!... Malgraŭ ĉio mi naŭzis.

Kaj mi venis Brazilion. Nova lando, novaj kutimoj, diras fama konsolilo! Kaj feliče mi ne estas nervomalsana. Tie-ĉi, kiel mi diris, ne plu estas tago de l'patrio, sed semajno de l'patrio. Oni ne paradas unu matenon, unu tagon, sed jam du monatoj antaŭe oni bruas malhelpas ĉian normalan aktivecon per antaŭpreparoj. Ne nur la soldatoj flagrumas, ne nur la kazernaj parazitoj pavanas: oni aŭdacas devigi ĉiujn infanojn niajn en la partopreno de tiu herezaĵo, kaj ne nur dum unu semajno, sed dum du monatoj oni poluras tiun grandan turniron de l'homa frenezo, per la brutigo de niaj filoj. Jes, kiu ajn estas la lernejo, kiu ajn estas la aĝo de la geknaboj, dum pluraj semajnoj la studoj estas paralizitaj, ĉar minimume du horojn tage la povraj infanoj devas paradmarŝadi ĝis lacego, sub gvido de soldatoj, kaj paroksismo: sub komando de ĉiaj religiuloj, monaĥoj kaj monaĥinoj! Kaj miloj da personoj aprobe admiras, subtenas tion, plezure suferas, ke siaj gefiloj, tiel eluzas sian tempon kaj infanecon. Nenian malkonsenton mi aŭdis, neniu pripensis la aferon, aŭ pli ĝuste argumentas jene: "Tio fortigas la amon al Patrio, firmigas la disciplinon kaj distras la infanojn!" Kion ni respondu al tiaj maturuloj!... mi eĉ ne plu naŭzas, mi bolas!

Neniu laŭtigas sian voĉon, neniu denuncas tiun skandalon, tiun atencon al la homiĝo de niaj karaj infanoj, ĉiuj silentas, rezigne, patriote!

Tiel plu iras la kulto al kolorigitaj ĉifonoj, plu iras la fetiĉismo, kreskas la tutmonda konfuzo. Mallarĝiĝas niaj agoblecoj kaj libereco, en la militista kaj pastra despotismo, en tiu kreskanta tutmonda faŝismo.

Faŝismo, jes, ĉar nur la fasismoj, la ruĝaj kiel la nigraj, atingas tiun staton. Mi mem memoras, ke unu fojon mi tiel paradis kiel juna lernanto, estis en 1942, kiam Hitler okupis Francion!

Faŝismo jes, kiam ĝuste nun, dum oni paradas, la tagĵurnaloj pleniĝas per raportoj pri atenco al la preslibero, al la penslibero. Oni arestas tiun ĵurnalisto, malpermesas alian gazeton, ktp, ktp. Ni, ni ne bezonas scii kiu pravas aŭ malpravas, ni estas kontraŭ ĉiaj politikaĵoj, kaj nur konstatas faktojn. Nia celo estas foriĝi el la mistifikado por konservi la malgrandan liberecon kiun ni ankoraŭ posedas. Ni strebas memstare pensi, kleriĝi, observi, verifiki por resti homoj kaj por ke niaj filoj estu ankaŭ en vera homeca socio...

Tial ni reagu. aŭ pereu en la ŝtormo kun niaj patriflagoj.

Garolo

Konkurenco

Jansen kaj Smit estis konkurantoj, t. e. ili havis samajn metiojn, samajn bezonojn kaj samnivelajn metikapablojn.

Iun tagon Jansen ricevis etan heredaĵon kaj kiel prudenta homo li investis ĝin en sia entrepreno: li aĉetis maŝinon. Per tre alloga reklamilo li komunikis al siaj klientoj (ankaŭ al tiuj de Smit!) pri la ebloj por pli bona kaj rapida servo kaj... pli malalta prezo. Tiel komenciĝis.

Post unu jaro, Jansen aĉetis ŝarĝaŭtomobilon. Smit iomete malvigliĝis. Sinjorino Jansen pli kaj pli vidiĝis en aristokrataj rondoj. Sinjorino Smit restis kia ŝi estas.

Du jarojn poste Jansen aĉetis duan maŝinon kaj dungis serviston; Smit maldungis du kaj lia vizaĝo spegulis la zorgojn.

Kvin jarojn poste. Jansen aĉetis luksan aŭtomobilon, funkciigis trian maŝinon kaj dungis du laboristojn. Smit maldungis kvin.

Post sep jaroj. Sinjoro Jansen fariĝis fabrikanto kaj havis ĉiujn klientojn. Smit bankrotiĝis kaj senlaboriĝis, kune kun la duono de sia antaŭa dungitaro. La alia duono iris ĉe Sinjoro Jansen.

Sinjorino Jansen dungis kuirejistinon. Sinjorino Smit penadis por kromenspezoj. Kiam la entrepreno de Sinjoro Jansen jubileis, "Sinjoro" aranĝis festtagmanĝon por la tuta dungitaro, ĉar li estis bona estro. Kaj la pastro ankaŭ ĉeestis, ĉar Jansen estis pia homo kaj konsideris siajn riĉaĵojn nur kiel "pruntita"!

Kaj kiam la pastro antaŭ la tagmanĝo preĝparolis, li atentigis pri la kresko de la entrepreno kaj pri ĉiom bona, kiun Jansen danke povis ricevi kiel rekompencon por fervoro kaj energio.

Rigardante al la montoj, oni facile forgesas la valojn. La pastro tiel dankis pro prospero kiu estiĝis pro malprospero de aliaj, li dankis pro bonfarto kiu baziĝis sur malriĉo de aliaj.

Kaj en ĉi-tiu socio la riĉo de unuopuloj estas bazita sur la malriĉo de multaj, tiel ke prospero kaj mizero nedisigeble estas ligitaj kiel montoj kaj valoj.

Sed venos nova tago, kiu donos lokon al la Amo por la kunulo, vera sociordo, en kiu estos agnoskita la RAJTO de kaj por ĉiuj.

C. O. el "Ekonomia Egaleco"

Historio, Ŝovinismo kaj Popolo:

ĈU SANTOS DUMONT ESTAS PATRO DE AVIADO?

Ni jam de longe scias, ke historio servas ĉiam ŝovinismon, kaj ke la popolo restas blinda kaj fanatika en hitoriaj interpretoj. Tial aldoni ion plian, estas nur ripetadi konitaĵon. Sed, ĉar nia celo estas antaŭ ĉio, laŭtigi nian voĉon fronte al la mistifikado, tiu-ĉi artikolo plene kaj daŭre praviĝos.

Oni nun en Brazilio festas la 50-an datrevenon pri la flugoj de la aerpioniro Santos Dumont. Nu, mi ne priskribos ĉion, kion oni faras pri tiu soleno, ĉiuj tion facile divenas: memorigaj platoj, medaloj, flagoj, diskursoj, silentaj minutoj, ktp. Miloj da artikoloj aperas, reaperas, batas kaj rebatas, do ĉion raporti mi ne povas nek volas. Mi nur menciu, ke ĉio komenciĝas tiel: "Ni, Brazilio, honoras la plej grandan homon... la grandan gloron de l'patrio... la Patron de Aviado... la unuan homon kiu flugis per aparato pli peza ol la aero... la unuan kiu navigaciis per direktebla aerostato... la unikan malkovrinton de l'aerodinamikaj leĝoj... ktp.". La tutaj enhavoj klopodas demonstri tiujn blindajn postulatojn, ĝis kiam senmanke oni konkludas: "Gloron al Santos Dumont... Gloron al la brazilia popolo... Gloron al la patrio... Vivu Brazilio!"

Jen tie-ĉi la kompleta ŝovinisma dekoro, la granda kulto kiu atingas en tiu lando, proporciojn malofte renkonteblajn en nacioj nomitaj: demokrataj. Kaj mi tuj diru al vi, ke tia kulto plene sukcesas kaj efikas! Mi povas certigi al vi, ke vi sporade renkontos homon, tiel analfabetan kiel kleran, kiu ignoras la "patrecon" de Santos Dumont rilate al aviado! Mi oftege ludis demandante: "Kiu estis la unua flughomo?" La senescepta respondo estis: "La Brazilo, Santos Dumont!"... Kaj se okaze mi ekneis, spontane, mil fanatikaj voĉoj kaj pugnoj minacis ekstermi min. La braziliaj legantoj kiuj estas skeptikaj, provu!

Tia zelotismo, tia ŝovinismo, tia idiota stulteco, povus esti eltenebla, (tamen ne de ni, sennaciistoj!) se historie la diritaj faktoj estus realaj. Ve! la plej parto de la bazaj diroj, kiel: "patro de aviado", unua flughomo, unua direktinto de aerostatoj, malkovrinto de aerodinamikaj leĝoj, estas puraj groteskaj mensogoj, pura blufo servanta al obskurantismo.

Mi mem delonge interesiĝas pri aviado, kaj tiel havis okazon esplori ties historion. Mi unue rememorigu al vi, ke ĉiu scienca paŝo ne apartenas al unu, dek, mil homoj, sed ĝi estas konsekvenco de ĝenerala evoluo kaj metiĝas tuj je la servo de la homaro, kio, feliĉe okazas spontane. Do aparta kulto kaj fiero de iuj homgrupoj estas tute malracia, supraĵa reago inda je pierotoj. En aviado, en flugarto, tio ankoraŭ pli veras.

Certe, la flugarto naskiĝis kiam la homo ekpensis kaj admiris la vastan, profundan ĉielon, tiu senfina kampo por esploroj! La legendoj pri Ikaro, Pegaso, Esopo, inter mil aliaj, atestas tion. Ĉiuj scias, ke Leonardo de Vinci jam planis flugmaŝinojn kies principoj estis tute similaj al la hodiaŭa tekniko; tamen neniu diras, krom sendube la Italoj, ke Vinci estas la patro de aviado... Ni ne citu nun ĉiujn pionirojn, teoriulojn, realigantojn ĉar librego ne sufiĉus, sed ni tamen diru, kaj tion ni povas konsideri kiel vero se oni objektive kaj senpartie rigardas la historion, ke multaj homoj flugis antaŭ Santos Dumont. Ni ekzemple trovas: Lebris (dato de flugoj: 1856), Mouillard (1865), Montgomery (1884), Lilienthal (1891), por citi nur kelkajn el la ĉefaj, kiuj sukcese efektivigis studojn pri birdaj flugoj, kaj flugojn per glisiloj. Laŭ mi tiuj studoj kaj flugoj estis fundamentaj ĉar ĉiuj postaj pioniroj sin bazis sur tiuj eksperimentoj. Ni ne forgesu, ke la glisilo plene uzas aerodinamikan leĝon, kaj ke aviadilo estas nura glisilo kun motoro!

En la bieno de la aviadiloj (aparatoj pli pezaj ol la aero kun motoro) ni renkontas la jenajn flugojn: Clément Ader (9-a de oktobro 1890), Orville kaj Wilbur Wright (ek de la 17-a de decembro 1903), Trajan Vuia (marto 1906) kaj... Santos Dumont (13-a de septembro, 23 de oktobro 1906).

Pri la direkteblaj aerostatoj, ni menciu, sen paroli pri la sferaj aparatoj kiuj iel estis direkteblaj, la aparaton de Gaston kaj Albert Tissandier (1883), la aerostaton de Renard kaj Krebs (9-a de aŭgusto 1884) kaj von Zeppelin (3-a de julio 1900), fine elstariĝas Santos Dumont, kiu ĉirkaŭiras la Efelturon en Parizo, gajnante la premion Deutsch de la Meurthe (oktobro 1901).

Kiel ni vidas estas multaj "Aviadaj Patroj'"... almenaŭ unu en ĉiu nacio!: Ader-franco, Wright-usonano, Lilienthalgermano, Vuia-hungaro, Cayley-anglo, Vinci-italo, Dumont-brazilo... kaj certe estas iu Popov en Rusio, pri tio mi legis antaŭ nelonge!

"Ĉu do Santos Dumont faris nenion en la batalo?", vi emas demandi. Vere Dumont laboris por aviado. Pli ĝuste li laboretis kaj laborigis, ĉar ni ne forgesu, ke li estis riĉega, lia patro estis la "reĝo de la kafo" de Brazilio! Irinte en Parizo, per tiom da mono li facile sin mondane konigis, preparante la terenon ĉe la altaj instancoj por siaj propraj eksperimentoj. Ja ĝis nun, ĉiuj eksperimentoj estis sekretaj kaj kaŝe faritaj... pro la publika opinio kiu kompreneble konsideris la homan flugeblecon kiel diabla herezaĵo. Do Santos Dumont ekvenis en la momento de la maturiĝo de la ideo pri flugo kaj helpis tiun maturiĝon, tiel markante la komencon de la oficiala disvolviĝo de aviado. En tiu stato de oficiala morala apogo de la aŭtoritatoj, Santos Dumont gajnis la unuajn premiojn, establis la unuajn oficialajn rekordojn pri flugo kaj navigaciado aera. Tie-ĉi limiĝas la historia verko de Santos Dumont. Tio estas ja granda verko kiu postulas ingenion kaj aŭdacon, ni do fervore imitu Santos Dumont... sed ne diigu!

Ĉu plia konkludo estas bezonata? Ne, ni nur povas bedaŭri ke scienco helpu al malraciaj kultoj, ke pioniroj estu blinde sanktigitaj, idoligitaj, anstataŭ ke oni home, praktike postsekvu ties verkon. Ni bedaŭru ke historio estu la instrumento de ŝovinismo kaj de la konsekvenca obskurantismo. En tiu bedaŭro, ni ĉiuj reagu, kun niaj tutaj fortoj.

28.926

Sennaciisto deziras korespondi kun esperantistoj-vegetaranoj pri la temo: establo de naturista kolonio. Skribu al J. Dorn, ĉe Z. Landaŭ, Zvi Bruk str. 3, Tel-Aviv Izraelio.

* * *

Antaŭ ol elekti vian stenografisistemon, informiĝu bone kaj ne forgesu, ke ekzistas internacia sistemo aplikebla por ĉiuj lingvoj, inkluzive por Esperanto. Certe via miro kreskegos kiam vi konstatos, ke estas vera alfabeto ... alfabeto kiu perfekte korespondas al nia nuna epoko de rapidego kaj ĝenerala evoluo. Tiu mirindaĵo estas INTERSTENO. Pliaj informoj tra nia sidejo.

* * *

Se vi restas en S. A. T., vi nepre akiros sennaciecan pensmanieron kaj ankaŭ lernos memstare pensi ... Do aliĝu kaj realiĝu, vi ĝuos la legadon de de "Sennaciulo". Kaj abonu "La Objektivon" kiu provos kompletigi vian rigardon pri nia mondo kaj socio per objektivaj analizoj. Plie la Frakcio "Bellamy-Abundo" en SAT, nepre donos al vi la ekonomian solvon por nia racia socio. Se tion vi ne faris, petu informojn, respondi estos por ni plezuro.

* * *

Por esti vere objektivaj, kiel indikas la titolo de nia organo, ni decidis pritrakti certajn problemojn de nia socio, sub formoj de intervjuoj, kun komentarioj, kritikoj kaj rebatoj. Ni tiel trarigardos la politikojn, la filozofiojn, religiojn ktp. En la venonta numero ni komencos per psikologio, kun intervjuo al profesoro Igor Caruso, fama psikologo el Vieno. Ni petas, ke ĉiuj bonvolu kunlabori por tiel altniveligi nian organon kaj doni al ĝi la rangon kiun ĝi rajtas havi kaj meritas.

Ni ripetas, ke la kunlaboro de ĉiuj estas nepre necesa: Sendu vian artikolon!

Donacoj al la Objektivo:

K-do Francisco Demacq Rosas el São Paulo . . . . . $ 200,00
Nian koran dankon al tiu amiko kiu bonege komprenis nian situacion.

Legu kaj Opiniu:

Teorio estas belega afero, sed, sen praktika aplikado ĝi estas vana. Kaj certe, la revo daŭra de sinceraj idealistoj kaj teoriuloj, estas vivadi reale la idealojn kaj teoriojn. Tial ni bonvenigis la sugestojn de kelkaj amikoj el diversaj partoj de nia planedo pri fondo de kolonio.

Tiu kolonio estus organizita laŭ niaj teorioj, niaj sociaj konceptoj, ĉu spiritaj, ĉu materialaj. Ni ekzemple antaŭvidas naturistan vivon, en libera komunismo (vera socialismo). Post konsidero, analizado de ĉiuj punktoj koncernantaj la homon en la socio, ni povas antaŭvidi la jenan skizon por la kolonio. (Tio kompreneble estas nura ekzemplo, kaj ne definitiva starpunkto!)

1) Naturisma Vivado, kun frukt-vegetara nutrado.
— Naturisma urbanismo.
— Racia uzo de scienco kaj tekniko.
— Konsekvencaj agrikulturo kaj industrio.
2) Organizo en anarkia principo: (Atentu ke tie-ĉi: Anarkio ne signifas ĥaoso).
— Egaleco ekonomia: principo de distribuekonomio, ktp.
— Libereco individua: de penso, skribo, kredo, kreo — Aŭtoforigo de mistifikado per memstariga edukado.
— Konsekvencaj-: Sennaciismo, senreligiismo, senpolitikeco ktp.
— Integra demokrateca organizado.

Ni scias, ke tio aspektas nun treege utopia entrepreno, ni scias, ke restas montegoj kvazaŭ ne supereblaj. Se ni ankaŭ scias, ke estas en la kadro de la eblecoj por homoj kiuj scias sin oferi, rezigni je kutimaĵoj kaj kiuj volas konscii sian homan kaj socian pozicion kaj rolon.

Ni hodiaŭ ne detaligos la sugestojn, ni nur petas, ke tiuj kiuj interesiĝas pri la afero kaj mem havas proprajn pozitivajn ideojn kaj sugestojn, kontaktu nin tra nia Asocio.

Sen Pastreca Maniero!

Ni vivas ĉirkaŭite de misteroj. La scienco liveras al ni tro malmulte da klarigoj.

Vi vane atendos kontentigan respondon de sciencisto, se vi demandas lin, ekzemple, pri la kaŭzo, kiu igas kurantan hundon halti ĉi-tie kaj tie, flaradi kaj fine ... levi la postan piedegon por urineti sur elektitan lokon.

Sed demandu pastron. Neŝanceliĝe li tuj respondos, ke tiu hunda kutimo ekzistas simple pro tio, ke Dio tiel decidis per sia senlima saĝo. Sekve ni devas vidi en tiu stranga fakto kaŭzon por ami kaj adori la kreinton de la homoj, de la hundoj kaj aliaj bestoj ...

Kaj oni devas konstati, ke tia respondoj estas bone akceptataj de la amasoj. Ĝenerale, sufiĉas, ke homo parolu aplombe, senhezite kun certa tono, por ke granda plimulto konsentu kun la diroj de la parolanto kaj eĉ lin aplaŭdu.

Scienculo ĉiam dubetas, hipotezas kaj donas la klarigojn, kiuj ŝajnas al li en la momento la plej akcepteblaj. Sed li bone konscias, ke liaj klarigoj eble ne plu taŭgos post kelka tempo, se novaj eksperimentoj malkonfirmos la hipotezon ...

Grandan influon sur la amason ne povas havi scienculo.

Politikaj gvidantoj kredeble tion bone scias. Ili prefere imitas la pastron. Ili parolas kun aplombo, asertas, kvazaŭ profetas, Tial ili kutime trafas sukceson: oni aplaŭdas ilin kaj obeas ...

Mi opinias, ke en SAT, kie ni celas instigi homojn al pensa memstareco, estus domaĝe, se regus la pastreca maniero. Regu prefere la dubema metodo de la scieuculo. Se tiel estos, rezultos toleremo, konkordo kaj unueco ....

LANTI.

NU ...!

Se vi ŝatas tiun organon kaj aprobas niajn ideojn. ne hezitu, kunlaboru, aliĝu kaj abonu! Petu senpagajn ekzemplerojn por disdoni al viaj amikoj.